

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiel ni anoncis la pasintan semajnon, ni daŭrigas la diskutadon de la kritikoj al niaj radioprelegoj pri la geografia nomenklaturu, ricevita de sinjoro Tibor Sekelj.

A.- Sinjoro Tibor Sekelj nin citas : « *Esperanto estas lingvo, kiu ne digestas la idiotismojn, eĉ se ili estas zamenhofaj kiel **patrujo** kaj eble **esperantujo*** » kaj li aldonas : « *Tute erara supozo, ĉar ambaŭ vortoj estas plene digestitaj, senkonsidere al ilia logika aŭ nelogika deveno. Nun ĉiu, verkisto aŭ simpla parolanto, nature uzas ambaŭ vortojn, kaj estas vana klopodo per etimologia cerbumado provi kontraŭbatali ilin.* »

Cl.- Kio min tre interesas, estas konstati, ke fakte oni ne refutas, ke **patrujo** kaj **esperantujo** estas idiotismoj. Se vere tiel estas, ekzistas du eblecoj : ilin akcepti kiel novajn radikojn kaj registri en la vortaro la plenajn formojn **patrujo** kaj **esperantujo**, kiel oni registris **esperanto**. La alia ebleco estas aliel difini la signifojn de la sufikso **-uj**. Sed, kontraŭe al la diroj de Tibor Sekelj, ekzistas multaj verkistoj kaj parolantoj, kiuj evitas tiujn formojn profite al la logikaj formoj **patrio** kaj **esperantio**. Fakte ili kontraŭbatalas tiujn du idiotismojn.

A.- Sinjoro Tibor Sekelj poste skribas citante nin : « *La internacia lingvo iĝas pli kaj pli preciza per pli kaj pli atenta analizo de la signifoj de la kunmetoj kaj riĉiĝo en fakaj terminoj.* » Kaj li aldonas : « *La fakaj terminoj certe riĉigas la lingvon, sed la analizado tute ne. Anstataŭ ĝi mi dirus la konstanta uzado en ĉiuj sferoj de la vivo.* »

Cl.- Nia respondo : Vi ne povas skribi en esperanto sen analizi viajn vortkunmetojn. Mi ne vidas, kial la konstanta uzado kontraŭus la analizadon. Kontraŭe, estas ĉar esperanto estas uzata, ke ĝia analizo iĝas pli kaj pli preciza.

A.- Ni redonu la parolon al sinjoro Tibor Sekelj : « *Difino de la sufikso **-ar**. Vi klarigas, ke tiu difino (kolekto de samspecaj estuloj aŭ objektoj, kiuj estas ligitaj inter si kaj formas unu apartan tuton, unu kolektivon objekton) por **homaro** plej konvenas al gento aŭ raso. Tamen, ĝi tute egale konvenas al familio, oficistaro, laboristaro, komunumo, gento, tribo, raso aŭ homaro. Sed la forto de la lingvo estas ĝuste tiu, ke la popolo akceptis la signifon de la vorto **homaro**, senkonsidere ĉu la gramatika ekzameno aprobas aŭ ne la signifon. La popolo estas suverena. Eĉ se ni ĉiuj konscius, ke ĝi estas mistrafo, ĝi jam estas propraĵo de la parolantoj, ne de la gramatikistoj. Ĝi restos !* »

Cl.- Nia respondo : Povas esti, ke ĝi restos. Tiam oni devos aliel difini la signifon de la sufikso **-ar** aŭ registri la nomon **homaro** kiel memstaran radikon. Pri la forto de la popolo en esperanto mi iom dubas. La popolo plej ofte parolaĉas esperanton forgesante la akuzativon, kreante formojn kiel **dananino**, **francano**, ne distingante **komenci** kaj **komenciĝi**, **fini** de **finiĝi**. Mi ĵus partoprenis kongreson kaj havis la okazon aŭdi interesan kritikan raporton pri la Universala Kongreso en Helsinko farita en tia dialekto. Esperanto estas ĝis nun la lingvo de elito. Ĝin forĝis la verkistoj, gazet-redaktoroj, radio-prelegistoj, instruistoj. Ne ankoraŭ venis la tago, kiam la popolo decidas. Hodiaŭ aŭ ĝi penas paroli korektan esperanton, aŭ ĝi simple parolas ĝin sufiĉe malkorekte. Mi ricevas sufiĉe multe da leteroj de radio-aŭdantoj por konstati, ke la eraroj, kiujn oni aŭdas en la parola uzo troviĝas en la skriba uzo. Oni vidu en tiu konstato, ke la esperanta popolo fuŝparolas esperanton, nenian kritikon kontraŭ la popolo aŭ kontraŭ esperanto. La popolo ne havis la ŝancon frekventi esperanto-kurson en la deviga studperiodo.

A.- Sinjoro Tibor Sekelj nin citas : « *La klaran **i**-sufikson ŝatas ĉefe la sciencaj kaj teknikaj rondoj. La turism-oficejoj...* » kaj li aldonas : *Ni ne estu naivaj. Kiu turistoficejo en la mondo*

havas ian ajn preferon koncerne esperantan gramatikon ? Ili simple akceptas la tradukon, kiun vi aŭ mi aŭ iu ajn alia proponas al ili, kaj nenian problemon vidas en la afero. »

Cl.- Nia respondo : Tamen mi ne faris mian aserton sen iomete rigardi, kio okazas en la faktoj. En la Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Internacia Lingvo mi rikoltis multajn turismajn prospektojn, kaj simpla statistika kontrolo permesas konstati, ke en la turisma lingvo la formoj Italio, Germanio, Jugoslavio estas sisteme preferataj al Italujo, Germanujo, Jugoslavujo. Estas la esperantistoj mem, kiuj verkas por la turism-oficejoj, kiuj faras tiun elekton. En mia kontrolo troviĝis nenia naiveco.

A.- Sinjoro Tibor Sekelj, koncerne la uzon de la nomenklaturu de la nun proponata *Mondmapo* en la lernejoj diras : « *Nu, bone aspektus Esperanto, se ni lasus ĝiajn lingvajn elementojn al la decido de la patroj de la infanoj, kiuj ĝin lernas, homoj kiuj havas eĉ ne la plej etan ideon pri Esperanto ! Se ili el Kebeko-Kebek deduktas tuj ke Otavo en franca estas Otav kaj Toronto Toront, ili same povus diri : front estas frunto, do pont estas punto kaj conte estas kunto. Kaj kia seniluziigo kiam ili malkovros, ke ne estas tiel. Ili tuj malpermesas al la infanoj lerni tian lingvon, kiu ne koincidas kun la franca ! »*

Cl.- Nia respondo : Unue estas granda konfuzo. Mi diris, ke la nomenklaturu proponata en la *Mondmapo* ne estas uzebla en la lernejoj por la instruado pri geografio, ĉar ĝi kripligas nomojn kiel Misisipi, Helsinki al **Misisipo, Helsinko**. Jen unu afero. En mia tuta argumentado mi ĉiam distingis la komunajn nomojn de la propraj nomoj. Ne estas, ĉar la komunaj nomoj finiĝas en esperanto per **o**, ke necese la propraj nomoj devas finiĝi per **o**. Se ekzemple ni prenas la urbonomon **Ottawa**, ĝi ne necese devas iĝi **Otavo**. Neniam mi diris, ke esperanto devas koincidi kun la franca. Jam la pasintan semajnon ni konstatis, ke sinjoro Tibor Selej provas komprenigi al ni, ke ni estas influataj de la franca lingvo. Mi ĉiam defendos la opinion, ke se oni instruas la nomenklaturon de la *Mondmapo* en la lernejoj, la lernejoj malpermesos tiun instruadon. Neniam la kripligo de formoj universale konataj estos permesata, ĉu tio plaĉas aŭ malplaĉas al ni. Tio estas la realeco. Ni devas nin submeti al ĝi.

A.- La venontan semajnon ni finos tiun diskutadon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-